Em. Jaroslavskij

M. ARGER
10, rue Lamartine
Paris IXe

# RESPONDOJ AL EKSTERSOVETIAJ ATEISTOJ

OGIZ — 1932 — GAIZ

JAR
211

CENTRA KONSILANTARO DE UNIO DE MILITANTAJ ATEISTOJ EN USSR

Em. Jaroslavskij

# RESPONDOJ AL EKSTERSOVETIAJ ATEISTOJ

MOSKVO
OGIZ — GAIZ
1932

211
JAR

718

Ем. Ярославский

ОТВЕТЫ ИНОСТРАННЫМ БЕЗБОЖНИКАМ

НА ЯЗ. ЭСПЕРАНТО

# LA KVARA DELEGITARO DE EKSTERSOVETIAJ ATEISTOJ AL USSR.

Dum la 14-a datreveno de l'Oktobra revolucio Unio de Militantaj Ateistoj (UMA) de USSR gastigis kvaran fojon delegitojn de Internacio proletliberpensula. Sed ĉi tiu laŭkalkule kvara delegitaro estis la unua, kiun delegis al Sovetlando la Internacio, konkerinta la revolucian gvidantaron, post kiam ĝi forpelis el siaj vicoj la social-faŝistojn Hartwig, Sievers kaj kompanion. La delegitaro estis samtempe la unua laŭ sia internacia konsisto. Ĝin konsistigis reprezentantoj el 8 landoj. Tri antaŭaj delegitaroj konsistis el reprezentantoj proletliberpensulaj de iu ajn sola lando. Ja ĉi fakto mem atestas tion, ke la revolucia Internacio surpaŝis vastan vojon de la internacia ateista laboro, ke ĝi vere fariĝas internacia organizaĵo de la proleta ateismo. Post la kongreso en Bodenbach-Tetschen, en kiu estis elinternaciigitaj pro perfido kaj disrompo la social-faŝistoj, — la Trocki-ana gazetaĉo en Leipzig skribis ke la komunistoj en la Internacio restos brile solaj, ke ilin neniu sekvos. La efektivo renversis la falsan, sur nenio bazitan progrnozon de l'kontraŭrevolucia trockiismo.

Tiutempe, kiam la Internacio proletliberpensula delegis sian delegitaron al Sovetlando, ĝiaj organizaĵoj troviĝis en diversaj landoj de Eŭropo, Ameriko, Azio kaj Aŭstralio. Dum la jaro pasinta post la Bodenbach-Tetschen-a kongreso, la Internacion aliĝis 12 novaj organizaĵoj.

La social-faŝistoj Hartwig'oj kaj Sievers'oj, agante laŭ direktivoj de la II Internacio, ĉiumaniere penis malallasi delegitarojn al Sovetunio. La unuaj tri delegitaroj vizitis Sovetion spite al social-faŝistoj. Ĝis kiam gvidpotenco fakte apartenis al Hartwig kaj Sievers, vasta internacia delegitaro ne estis organizebla, ĉar la ĝenerala sekretariaro volis nenion entrepreni tiucele. Kontraŭe, Sievers malaranĝis IPL-ekzekutivan kunsidon en Moskvo, samtempigita kun la II kongreso de sovetiaj ateistoj kaj minacis eksmembrigi ĉiun, kuraĝintan veturi en Sovetunion.

La ĝenerala sekretariaro de l'revolucia Internacio, kontraŭe, tutforte penis, por ke estu organizita kiel eble plej vasta internacia delegitaro internacia, kaj ĝia laboro sukcesis.

Eĉ pli. La ĝenerala sekretariaro metis sia celo enigi en la delegitaron reprezentantojn de Hartwig-Sievers'a asocio. Samtempe estis efektivigita varbado en la delegitaron ankaŭ de reprezentantoj el kristan-socialistaj organizaĵoj. Rezulte en la konsisto de la kvara delegitaro troviĝis krom la membroj de la revolucia Internacio ankaŭ 5 membroj el Germana liberpensula asocio (Sievers'a organizaĵo) kaj 3 membroj de kristana asocio de junlaboristoj.

Unu el taskoj de l'Internacio proletliberpensula estas batalo kontraŭ kalumnio kaj mensogo, kiun disfamigas pri Sovetlando klasmalamikoj de l'proletaro, kiun precipe rafinas ĉiureligiaj pastraĉoj. La eklezio estas ĉefa dissemanto de mensogo. De-sur preĝejaj katedroj, de-sur paĝoj de eklezigatoj, revuoj, specialaj broŝuroj, per radio elverŝas torentojn da plej fia kaj aĉa kalumnio «animzorgantaj patroj», komencante per lia vatikana eminenco, per ĉefepiskopoj Berlin'aj, London'aj, Paris'aj, per pastroj Mukermann'oj, Algermissen'oj kaj finante per nerimarkeblaj vilaĝpastroj. La eklezioj plej aktive partoprenas ĉiujn kampaniojn kontraŭ USSR: en unuaj vicoj ili estis en la kalumnikampanio pri «soveta dumpingo», pri «mallibervola laboro» kaj memkompreneble en la kampanio «krucmilitira», por kiu vokis Pius XI, ankaŭ en la senĉesa kalumnikampanio pri kvazaŭ persekutoj kontraŭ pastroj kaj kredantoj en USSR pro iliaj religikonfesoj.

Espero de l'mondburĝaro al la kultistoj estas tre simpla: la kredantaro opinias popojn «animzorgantaj patroj», perantoj inter dio kaj homoj, tiaj estaĵoj, kiujn inspiris «sankta spirito». Do, ĉu povas mensogi tiuj buŝoj, kies profesio estas ĉiam fari preĝon. Milionoj da kredantoj malkonjektas, ke la plej lertaj laŭprofesie mensoguloj ne estas troveblaj. Fabrikantoj de miракloj, de diaj malokazintaĵoj kaj revelacioj, ĉi tiuj «sanktaj» mensogistoj alkutimiĝis novan rolon ekde unua ekzisttago de Sovetunio, kunagante la socialfaŝismon kaj faŝismon.

Ja kion nur ne parolas ĉi tiuj profesiuloj: komunigo de virinoj, rekvizo de l'virina lakto, en Moskvo homoj paŝas nudaj, ĉar kun religio estas perdita ankaŭ hontemo, Sovetunio aspiras distribuon de Ĉinio ktp. ks., — jen estas kelkaj temoj el grandega kalumniaro, malamo kaj kolero. La celo de popoj, agantaj laŭ direktivoj de l'imperialismo, estas klara: timigi per komunismo filistrajn amasojn, kamparanaron kaj malprogresemajn tavolojn de laboristoj, forlogi de revolucia movado de l'proletaro, malhonorigi Kominternon kaj kompartiojn, estingeti la ?armegan amon al Sovetlando, kiun esprimas laboristamasoj. Ĉio ĉi kons..ĉigas «moralan» preparadon de l'imperialista milito kontraŭ USSR, ĉio ĉi devas fortikigi frontojn kaj postfrontan staton dum la milito kontraŭ Sovetrespubliko.

La revolucia Internacio liberpensula disvolvas vastan laboron por senvualigi fikalumniajn elpensaĵojn de pastraro. La delegitaro estas unu el samspecaj laborformoj. UMA, gastigante ekstersovetian delegitaron metis antaŭ si taskon montri tion, kio estaŝ, nenion kaŝante kaj nenion plibeligante, kaj siavice volis nur tion, ke la delegitaro, reveninte al hejmlandoj rakontu veron pri USSR. La laborista klaso, apogante sin je kolĥozanaro, sub gvido de la kompartio, ĉefata de k-do Stalin, marŝas de venko al venko. En la tria jaro de la kvinjarplano estis finkonstruita fundamento de la socialisma ekonomio. La sukceso de unuaj tri jaroj garantiis plenumon de la kvinjarplano dum 4 jaroj. La dua kvinjaro metas antaŭ USSR tutmonde-historian taskon — la konstruon de la senklasa socialisma socio. Ĉi sukcesojn la lando de Sovetoj atingis dank'al



heroeca entuziasmo de la laborista klaso kaj laboruloj, dank'al la socialisma konkurado kaj ŝturmlaboro. Ĉi sukcesojn la lando de Sovetoj atingis dank'al ĝusta linio de la kompartio kaj ties Lenina CK, senindulge batalinta por efektivigo de l'ĝenerala linio kontraŭ la kontraŭrevolucia trockiismo, kontraŭ dekstruma deflankiĝo, kiu sur nuna etapo estas laĉefa danĝero, kontraŭ «maldekstruma» oportunismo, kontraŭ paciĝemo kun ili kaj kontraŭ putra liberalismo.

UMA metis antaŭ si taskon montri al ekstersovetiaj kamaradoj, kielmaniere Sovetlando solvas la grandan taskon «atingi kaj superatingi» dum 10 jaroj teknik-ekonomie avangardajn landojn de Okcidento, montri la konstruadon de la socialismo, montri, kiel elkreskas novaj socialismaj bazoj de l'vivo, laboro, vivmaniero, kiel naskiĝas nova socialisma homo. Paralele kun la sukcesoj kaj grandegaj venkoj la delegitaro devis vidi ankaŭ niajn malfacilaĵojn. Malfacilaĵoj ne estas malmultaj, ĉar la proleta revolucio okazis en la malprogresinta lando, ĉar la proletaro kaj laborularo de USSR konstruas la socialismon ĉirkaŭitaj de malamikaj kapitalismaj landoj.

UMA metis antaŭ si taskon montri, kiel ĝi organizis kaj evoluigis antireligian laboron, kiel ĝi solvis fundamentajn principojn de l'marksismo-leninismo pri subordigo de batalo kontraŭ religio al interesoj de la proleta klasbatalo, montri, kiel la ateistaj organizaĵoj fakte realigas sian bataldevizon: «Batalo kontraŭ religio estas batalo por la socialismo».

Malgraŭ diferenco de soci-ekonomiaj kondiĉoj, en kiuj estas devigitaj labori ekstersovetiaj ateistoj, kompare kun kondiĉoj de sovetiaj ateistoj, ili sendube povas multon el UMA-sperto utiligi por sia laboro. Tial UMA metis antaŭ si taskon montri al la delegitaro kiel eble plejon el sia riĉega sperto ĉu rilate al laborenhavo, laborformoj kaj metodoj, ĉu rilate al organizo kaj konstruado de UMA mem.

La delegitaro ĉeestis en USSR pli ol unu monaton. La kamaradoj krom Moskvo vizitis Harkovon, Dneprostroj'on, Rostov'on-ĉe-Dono, sovĥozon «Giganto», Sverdlovskon, Voroneĵon kaj Leningradon. Dufoje la delegitaro partoprenis plivastigitajn kunsidojn de l'prezidantaro de CK UMA. En unu el tiuj kunsidoj parolis la prezidanto de CK UMA k-do Jaroslavskij. Lia salutparolado kaj respondoj al demandoj de l'delegitoj estas presitaj en ĉi tiu libro. La kunsido okazis post reveno de l'delegitaro el la vojaĝo tra USSR. La vojaĝo neforgeseble impresis, kiel tion atestas la deklaracio, jam antaŭ tiu tempo preparita de la delegitaro.

La granda konstruo de la socialismo jam plene respondis tiujn demandojn, kun kiuj ili alvenis en Sovetlandon, havigis al ili konvinkigan materialon, senmaskigantan ĝisfunde kaj plengrade kalumniagadon de pastraro.

En la kunsido la delegitoj faris multajn demandojn al k-do Jaroslavskij. Kelkiujn el ĉi demandoj ili kunmetis speciale laŭ kontraŭrevoluciaj pastraj broŝuroj kaj libroj por montri, unuflanke, kiuj demandoj estas «pritraktataj» en la religia literaturo, kaj, duaflanke, ricevi senpere de UMA-gvidanto tian materialon, kiu helpus al ili hejmlande sukcesplene batali kontraŭ pastraro kaj religio.

Ĉi demandgrupo atentas tiajn demandojn, kiel pri mallibervola anigo al UMA de ĉiuj lernantoj, pri ruĝaj (senreligiaj) enterigoj, pri persekutoj de pastraro pro ĝia kultplenumado ktp.

La delegitaro, forveturante el Sovetio, publikigis la deklaracion, en kiu ĝi mencias grandajn sukcesojn de l'socialisma konstruado, senvualigas popan kalumniadon pri Sovetlando, substrekas, ke la sola vojo, kapabla elirigi la proletaron kaj tutan homaron el la kapitalisma senelirejo, estas nur la diktaturo de l'proletaro. La soc.-demokrataj delegitoj kaj kristanasociaj laboristoj, partoprenintaj la delegitaron, de propra nomo faris apartajn deklaraciojn.

Reveninte hejmen la delegitoj disvolvis vastan laboron. Ili faris dekojn da referatoj, verkis multajn artikolojn, eldonis la broŝuron «La kvinjarplano sur kulturfronto».

Kun nekaŝata kolero renkontis la delegitaron la social-faŝistoj, faŝistoj kaj popoj. Social-faŝisto Sievers, ĉefante Germanan Liberpensulan Asocion (ne miskomprenu pri la Asocio de proletaj liberpensuloj de Germanio), aranĝis ĉion por forigi el gvidposteno de la Breslaŭ'a organizaĵo la delegitarmembron k-don Felsen. Sed la social-faŝisto ne ĝuste taksis siajn fortojn. Kune kun Felsen foriris el la germana liberpensula Asocio la tuta organizaĵo. Ernst Bückeley el Neŭstadt, senpartiulo, estis subjuĝigita de social-faŝista policestro pro aranĝo de l'referato pri sukcesoj de la kvinjarplano, ĉar ne estis plenumitaj kelkaj formalaĵoj. La juĝo kondamnis Enrest Bückeley por 3-monata enkarcerigo.

La blanka teroro ne haltigos la revolucian batalon de l'proletaro. La social-faŝistoj ne sukcesos ŝtopi buŝojn de tiuj laboristmiloj, kiuj vizitis USSR kaj vizitos ankoraŭ. La kvara delegitaro de IPL inter centoj da aliaj delegacioj daŭrigas sian laboron.

La tasko de UMA estas plifirmigi kaj vastigi internaciajn kunligojn. Per la revolucia konkurado, per korespondado, per gastigo de delegacioj ni plifirmigu revolucian unuecon de l'internacia ateistfronto de l'proletaro. La revolucia Internacio liberpensula laboras sub la standardo de Marks kaj Lenin. La devo de UMA, kiel la plej forta IPL-sekcio, helpi ekstersovetiajn organizaĵojn per sia sperto, per siaj scipovoj aranĝi ateistan laboron laŭlenine. La letero de k-do Stalin «Pri kelkaj problemoj de l'bolŝevisma historio» vokas la proletateistojn de la tuta mondo por proleta gardatentemo, por batalo kontraŭ la putra liberalismo rilate al burĝaj, enkalkulante ankaŭ social-faŝistajn, teoriojn kaj kvazaŭ teoriojn pri religio, pri ĝia deveno, pri kristanismo, pri antireligia batalo.

La social-faŝistoj malmoraligas revolucian movadon ne nur per sia perfida taktiko, sed ankaŭ per siaj perfidaj teorioj, kripligo de l'marksismo en ĉiuj problemoj. Kontraŭ la antimarksismaj teorioj de Kunov, Kaŭtski, Baŭer, kontraŭ la antimarksismaj skribaĵoj de Hartwig, Sievers la revolucia Internacio de proletliberpensuloj devas deklari senindulgan batalon. Batalo kontraŭ la social-faŝistaj teorioj, principoj, ideoj estas samspeca klasbatalo kiel batalo kontraŭ religio, kontraŭ pastrismo, en ĉiuj ĝiaj specoj kaj formoj.

Por la revolucia unueco de internacia ateista movado de l'proletaro!

Por la Lenina etapo de l'militanta ateismo!

A. L u k a ĉ e v s k i j.

---

# LA KUNSIDO DE L'PREZIDANTARO DE CK UMA KUNE KUN LA DELEGITARO DE PROLETLIBERPENSULOJ

6-an de novembro 1931 j.

(Stenogramo.)

K-do J a r o s l a v s k i j.— Kamaradoj, komence permesu flamsaluti vin je nomo de Centra Konsilantaro de Unio de Militantaj Ateistoj. Ni gastigas jam la kvaran delegacion de ateistoj, precipe de laboristoj, venantaj al ni el kapitalismaj landoj.

La kvara delegacio estas la plej multnombra delegitaro el la venintaj al ni ĝis nun. Ĝi konsistas el la kamaradoj, kiuj partoprenas antirelegian propagandon aŭ profunde interesiĝas pri ĝi. Mi diras tiel, ĉar mi scias, ke ĉi tie estas ankaŭ tiaj kamaradoj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al nia vojo de antireligia propagando.

Unio de Militantaj Ateistoj en USSR estas la plej multmembra sekcio de Internacio proletliberpensula. Oficiale en nia UMA estas kalkulataj ĉirkaŭ 5.000.000 membroj. Sed, certe, tio tute ne difinas la ciferon de sendiuloj en nia lando. Homoj, rompintaj ligon kun religio kaj neniel interrilatantaj kun eklezio, estas kalkulataj en nia lando nun per cifero plia ol 20.000.000.

Ĉiujare la ateista movado fortikiĝas kaj tio okazas ne nur en urboj, inter la industria proletaro, sed ĉi movado enkaptas nun m i l i o n a m a s o j n d e k a m p a r a n o j, kio tre gravas.

Vi scias, ke la kamparanoj estas multe pli religiemaj. Tuta cirkonstancaro de ilia vivo multe pli forte katenigas ilin per religio ol la laboristojn. S e d n i a r e v o l u c i o n e n u r e l r a d i k i g i s e k s p l u a t i s t a j n k l a s o j n d e b i e n u l o j k a j k a p i t a l i s t o j, k i u j h a v i s i n t e r e s o n p o r k e l a r e l i g i o e k z i s t u, k e ĝ i e s t u s u b t e n a t a. L a r e v o l u c i o ŝ a n ĝ i s t u t a n m a t e r i a l a n, e k o n o m i a n, m a s t r u m a n k a j k u l t u r a n s t a t o n d e p o p o l a m a s o j, d e p l e j v a s t a j p o p o l a m a s o j. Ĉi revolucio nek unu ŝtonon de religia mondkoncepto restigas ne tuŝita eĉ inter pleja amaso de l'kamparanaro. Ni havas nun multnombrajn ateistajn vila-

ĝojn, kie jam antaŭ kelkaj jaroj ĉiuj kamparanoj rompis ligojn kun religio. Ekz. vilaĝo «Bezboĵnoe» (Ateista), eks-«Verĥne-Tolučeevo» en eks-Voroneĵa gubernio estas granda vilaĝo, kie nun estas formita agrikultura komuno, kaj tie estas nur sola kredanto — unu virino. Ĉiuj ceteraj kamparanoj kaj kamparaninoj ne nur plenumas neniujn religiajn ritojn, sed ankaŭ nenion komunan havas kun religio kaj eklezio. La preĝejo jam delonge estas transformita en klubon. Ĉiuj kamparanmastrumoj estas kolektiviĝintaj. Bonstato de ĉi tiuj mastrumejoj tre multe altiĝis kaj atingis tion, ke nunjare ili estis devigitaj konstrui grandan elektrostacion kaj novplane alikonstrui la tutan vilaĝon. Ĉi tiu vilaĝo ne estas sola.

La ateista movado fariĝas ĉiam pli amaseca. Ĝi iras laŭ diversaj kanaloj. Ĝi iras per la lernejo, kie ĉe ni estas efektivigata la infanedukado tiamaniere, ke ne nur estas forigitaj ĉiuj ebloj de senpera influo de eklezio aŭ de ajnaj religiorganizaĵoj al la lernejo en la lernejo mem, sed ni la programojn de niaj lernejoj penetrigas per elementoj de antireligia edukado. Tio ne ĉiam okazas bone, ĉar ne ĉiuj niaj lernejinstruistoj estas bonaj antireligiuloj. Kelkiuj el ili mem ankoraŭ ne tute liberiĝis je religia mondkoncepto kaj tial ili malfacile kapablas efektivigi konsekvencan linion de antireligia edukado. Tamen la sovetaj lernejoj estas serioza efektivigilo de antireligia eduko. Kaj per la infanoj la lernejoj influas ankaŭ gepatrojn, iufoje ĉi influo estas gravsignifa.

La dua kanalo, laŭ kiu okazas antireligia edukado, estas nia presitaĵaro. Ni havas pli bonŝancan situacion, ol iu ajn antireligia organizaĵo en iu ajn lando. En nia sovetia presitaĵaro malebla religia propagando. Eble tio malagrable sonas por okcidenteŭropaj demokratoj, kiuj opinias, ke granda bonfaro estas tio, ke por interesoj de regantaj klasoj la gazetaro ne nur disvastigas malamikajn por la laborista klaso pensojn, sed eĉ ricevas subtenon de ŝtato por ilia propagando. Tiel statas en kapitalistaj landoj. Tie la plej malutila por la laborista klaso penso, malmoraliganta la laboristan klason, nebuliganta ĝian klaskonscion, ĉiel estas subtenata de l'tuta ŝtataparato. Nia proleta diktaturo aranĝis la aferon alie. Ĝi renversis ĉi tiujn rilatojn, ĝi dece starigis ilin. La vendado de venenoj estas malpermesata en nia lando. Ankaŭ ni malpermesis veninigi popolamasojn, utiligante presitaĵaron aŭ tribunon, per tiu aŭ alia idea veneno, kiu estas periga por la revolucio kaj kiu portas malutilon por la laborista klaso, sed tia veneno ni konsideras religion. «Religio estas opio por popolo» — tiu maksimo de Marks estas por ni gvidprincipo por agado same kiel nia alia devizo «Batalo kontraŭ religio estas batalo por la socialismo».

La tria kanalo, laŭ kiu okazas antireligia influo al laborulaĵaro estas laboro de nia kompartio kaj junkomunistaro. Ĉiu membro de nia partio devas fari antireligian propagandon. Ni havas ĉirkaŭ 3 milionojn da partimembroj (kune kun partikandidatoj) kaj pli ol 5 milionojn da junkomunistoj, kiuj ankaŭ faras antireligian propagandon. Do, sendepende de tio ĉu ili estas membroj de UMA aŭ ne (ĉe ni ne estas nepra kondiĉo, ke ĉiu komunisto aŭ ĉiu junkomunisto devas esti membro de UMA), sendepende de tio ĉe ni antireligian propagandon efektivigas 8 milionoj da membroj



de kompartio kaj junkomunista organizaĵo. Tio estas grandega forto. En nia partio, Tutsovetia Komunista Partio (de Bolŝevikoj) (TKP(b)), same kiel en junkomunista Ligo ne devas esti religiaj homoj. Ni estas libervola (volontula) kuniĝo de samideanoj; kaj se la proleto, honesta proleto estas sindona al la revolucio, kaj samtempe restas kredanto, ni ne devigas lin perforte eksiĝi el eklezio, ni ne devigas lin perforte rompi ligon kun religio, same kiel nine partianigas lin perforte. Ni diras al li: membro de nia partio vi ne rajtas esti, ĉar vi ankoraŭ ne lasis religion, ĉar por membro de nia partio estas nepra antireligia propagando.

Mi utiligas la okazon por respondi ĉi tie unu el la demandoj de la delegitaro, la demandon pri sindikatoj. Tio estas ankaŭ unu el seriozaj kanaloj, laŭ kiu fluas nia antireligia propagando. La statutoj de niaj sindikatoj ne malpermesas al kredantoj esti membroj de sindikatoj: ankaŭ ĉe ni estas kredantoj en la sindikatoj. En nia lando oni malpermesas eksiĝi el sindikatoj personojn pro tio, ke ili estas kredantoj. Se vi interesiĝas pri demando, farita de iu el vi, ĉu rajtas, ekz., artisto-sindikatano partopreni en iu ajn religia festeno, festo, partopreni eklezian ĥoron, ornami preĝejon, ni respondas, ke li kiel membro de sindikato ne povas esti eksigita el la sindikato pro tio. Sed ni havas inter artista sindikato tiajn unuiĝojn de artistoj, kiel ekz. asocio de proletaj pentristoj. Ĉi asocio opinias, ke certe, por asocio de revoluciaj, proletaj, pentristoj, ne estas permeseble helpi eklezion. Aŭ vi estas vera revoluciulo proletsence, tiuokaze vi ne povas, ne devas helpi malamikon de la proletaro, kia laŭ nia konsidero estas eklezio, aŭ vi helpas ĝin, tiuokaze vi ne devas resti en nia proleta asocio. Li rajtas esti membro de l'sindikato, sed li ne rajtas resti membro de tiu ĉi proleta revolucia unuiĝo. Li povas aniĝi al alia unuiĝo de artistoj.

Per la sindikatoj, per kulturfakoj de l'sindikatoj ni efektivigas grandan antireligian propagandon. En sia ĉiama kultur-kleriga laboro ili ankaŭ metas kiel unu el siaj taskoj la antireligian propagandon. Ni efektivigas antireligian propagandon ankaŭ per demonstrejoj — per kino, per teatroj. La teatro, kiel vi scias, povas tre forte influi sentojn de amaso kaj tial la teatro havas grandan eduksignifon. Vere, kelkaj niaj teatroj paralele kun novaj operoj, dramoj demonstras ankaŭ teatraĵojn, entenantajn religian mistikon. Ekz., vi povas en la Granda Teatro aŭskulti operon «Faŭsto», kiu entenas multe da ĉia religia mistiko, vi povas aŭskulti tiajn teatraĵojn kiel «Boris Godunov», «Aida», «Loengrin», «Princo Hovanskij» k. a., en kiuj estas ankaŭ sufiĉe da religia mistiko, sed kiujn ni prezentas nur pro tio, ke ili estas la plej gravaj muzikverkoj. Ni tute ne konsideras tiel, ke ni devas meti la proletaron sub vitrokovrilon, ne permesi al ĝi aŭskulti kaj rigardi en teatroj verkojn, kiuj havas plej grandan altvaloron, kvankam ili certagrade estas saturitaj per malamika al la proletaro ideologio. Nia proletaro, gvidata de l'kompartio estas tiom kreskinta ideologie kaj nia ĝenerala sistemo de kulturkleriga laboro estas tiom fortika, ke ni estas certaj, ke la laborista rigardanto kapablas marks-leninisme pritrakti ankaŭ la burĝan verkon. Ni helpas lin tiurilate. Sed samtempe tute serioze la teatroj, kino, kluboj decide alcelas revoluciajn teatraĵojn. Ni havas jam kelkajn antireligiajn verkojn en niaj teatroj.

Antireligia momento en niaj teatraj spektakloj entute ludas gravan rolon. La samon ni realigas en kino. Ni havas tre multajn antireligiajn filmojn kaj eĉ en tia filmo kiel «Kirasŝipo Potemkin» estas enigitaj momentoj de antireligia eduko, nome estas montrita kontraŭrevolucia rolo de popo kaj religio en revolucio.

Vi konsideru, kamaradoj, ke ni havas teatrojn ne nur en urboj. Nun preskaŭ en ĉiu granda vilaĝo, en ĉiu granda kolĥozo estas kluboj, popoldomoj, teatroj. Tie estas siaj rondetoj, siaj artistoj el kamparanoj mem, kaj ni liveras al ili tian materialon, kiu popularforme faras antireligian edukon.

Ni havas grandan antireligian eldonejon. Vi povas konatiĝi kun ciferoj pli detale. Postulo por antireligia literaturo estas grandega, sed ni ne povas ĝin kontentigi plene, ĉar konekse kun giganta kresko de l'socialisma konstruado pligrandiĝas postulo por ĉiuspeca literaturo, kaj ni simple ne havas sufiĉajn rezervojn da papero nunmomente por plene kontentigi kreskantajn bezonojn de amasoj. Tio sonas verŝajne, tre strange por vi, por ekstersovetiaj laboristoj. Se iu via gazeto havus eblon eldoni superfluajn 100—200 mil ekzemplerojn, ĝi tion farus tre volonte, sed ni estas devigitaj malaltigi eldonkvantojn de niaj gazetoj pro nesufiĉo da papero. La centra organo de nia komunista partio ĉiutage estas eldonata dumilionekzemplere. Ĝi estas la plej multe legata ĉiutaga organo. Sed se ni havus sufiĉan kvanton da papero, ni tre facile povus altigi ĉi tiun eldonkvanton ĝis 3,5 milionoj jam en nuna jaro. Tiom granda estas bezono por literaturo.

Nia gazeto «Bezboĵnik» (Sendiulo) estas eldonata depende de tio kiom da papero oni liveras al ni — 400—500 mil ekzemplerojn. Se oni liverus al ni sufiĉe da papero, ni povus tre rapide altigi eldonkvanton de nia gazeto ĝis 1-2 milionoj.

Krom tio ni havas la revuon «Bezboĵnik» (duonmonatan), monatan organon «Antireligioznik» k. a. gazetojn, ni eldonas multajn broŝurojn, sciencesplorajn antireligiajn librojn, amas-politikajn, lernajn, beletristikajn ktp. Mi opinias, ke nun la antireligia biblioteko de nia UMA estas la plej multvoluma kaj nia antireligia eldonaĝado estas la plej granda en tuta mondo.

Jen estas ĉefaj kanaloj, laŭ kiuj fluas nia antireligia propagando. La proleta ŝtato garantias al ni grandan subtenon. Ni havas eblon okazigi kunvenojn, referatojn, lekciojn, utiligi radion en plej grandaj ejoj. Ni havas kelkajn antireligiajn fakultatojn en superlernejoj. Ni havas ĉirkaŭ cent laboristajn antireligiajn universitatojn. En la Instituto de historio kaj filozofio, en Akademio de komunisma edukado, en Instituto de ruĝaj profesoroj ktp. ni preparas niajn propagandistojn. Ni havas en ĉiuj fabrikoj anguletojn kaj rondetojn de ateistoj, ni havas klubojn de ateistoj, en lernejoj grupojn de junaj ateistoj. Tial la antireligia propagando ĉe ni ĉiujare ĉiam fariĝas pli sukcesplena kaj enkaptas ĉiam pli vastajn amasojn.

Certe, kamaradoj, ni havas multajn mankojn en antireligia propagando. Iufoje pro tio, ke ĝi estas efektivigata de nesufiĉe kvalifikitaj kamaradoj, efektivigata tre primitive kaj neprofunde, ĝi estas deŝirata for de taskoj de la klasbatalo kaj socialisma konstruo, sed ni opinias, ke tuta nia antireligia propagando estas nur parto de nia klasbatalo, estas unu el vojoj de nia klasbatalo. La ĉefa nia tasko estas montri klasan esencon de religio, montri religion kiel ilon de klasregado, de ekspluatistaj klasinteresoj.



Inter diverstendencaj liberpensuloj estas multaj, kiuj opinias, ke la klasbatalo de la proletaro por la komunismo estas kunligebla kun religiaj konfesioj. Mi opinias, ke batalsperto devas montri al tiuj homoj, ke restante sur religia bazo ili ne kapablos sukcese batali por interesoj de l'proletaro. Ĉiutage ilia religia koncepto ĉiam pli maligos sin kontraŭ postuloj de la klasbatalo, ili ĉu frue, ĉu malfrue devos fari decidan elekton inter religiaj konceptoj kaj proleta klasbatalo. Ĉar tempo kiam Münzer gvidis kamparanan religian movadon, apogante sin je evangeliaj tekstoj, pasis: la evangeliaj tekstoj povas servi kaj servas ekskluzive por stultigo de proletaj kaj kamparanaj amasoj.

Kamaradoj, ni tre ŝatas vian alvenon, ni konsideras vian viziton kiel plifirmigon de tiuj grandaj internaciaj ligoj, pri kiuj ni ĉiuj estas interesitaj, ĉar ni opinias, ke nia afero estas ne nur afero de laboruloj de USSR, ni konsideras ĝin afero de l'internacia klasbatalo.

La disfalo, kiu okazis en la lasta kongreso de proletliberpensuloj en Bodenbach-Tetschen, komencis unuiĝon de revoluciaj proletliberpensuloj, aprobantaj decidan klasbatalon en la antireligia propagando. Ĉi tiu unuiĝo lastatempe multe sukcesis. Dum la kongreso, kiam ni ligrompis kun Hartwig' kaj Sievers'oj k. a., ni, certe, povis diverse opinii pri posta sorto de la Internacio. Nun por ĉiuj estas klare, ke tiu ĉi paŝo estis ĝusta. Lenin kelkfoje menciis, ke por ke okazu senerara unuiĝo por kolekti ĉirkaŭ si homojn, kapablajn batali por la proleta afero, estas necese firme disigi liniojn, estas necese apartiĝi de tiuj, kiuj malhelpas kompreni la taskojn de l'revolucia batalo. Kaj nia apartiĝo de la homoj, kiuj estas kapablaj batali «al du frontoj» en senco fakte helpkanti al la burĝaro kaj samtempe ŝajnigi, ke ili «deziras» helpi proletaron, ĉi apartiĝo estas necesa, por ke nia Internacio de ateistoj kresku kiel la proleta internacio, kaj ĝi efektive tia kreskas, vere, malpli rapide ol ni tion volus. Ĝis nun en Germanio asocio de Sievers preksimume du-trioble estas pli granda ol nia asocio. Sed tio ne devas nin ĝeni. Ni iutempe estis en nia lando malgranda partio, sed nun ni gvidas unu sesonon de la terglobo, ĉar ni apartiĝis de ĉiuj, kiuj trompis la proletaron kaj nebuligis ĝian konscion, ĉar nia linio, la linio de l'revolucia marks-leninismo estis sole ĝusta.

Ni kun vi havas grandajn taskojn. Vi devas en la kapitalismaj landoj efektivigi ankoraŭ pli grandan laboron kaj ni volas laŭforte helpi al vi tiurilate.

Jen ekz., vi demandas, ĉu estas ĉe ni tia oficejo, en kiu ni kolektus ĉiujn kalumniaĵojn, aperintajn en burĝa gazetaro kaj kiujn ni rapide refutus. Bedaŭrinde, ni tian oficejon ne havas. Tamen ni sufiĉe atente observas ekstersovetian gazetaron. Ni respondas la plej gravajn kalumniojn kontraŭ ni, sed ni volus, ke ĉe ni estu tiurilate tiel aranĝita laboro, ke ni konstante, sisteme ĉe helpu unu al la alia. Ekz., la problemo pri la centra muzeo.

Ĉi tie en Moskvo ni havas la centran antireligian muzeon. Mi opinias, ke ĝi nun estas unika institucio en tuta mondo, ankoraŭ nenie estas centraj antireligiaj muzeoj. Sed dume ĝi estas malforta muzeo, kvankam ĝi tamen faras komencon de tia organizaĵo, kiu povas servi al nia internacia antireligia movado. Al mi ŝajnas, ke estas la afero de ĉiuj IPL-sekcioj helpi kreon ĉi tie en Moskvo

*la centran antireligian muzeon mondsignifan*, en kiu estu kolektita ĉio koncernanta antireligian propagandon kaj laboron de ekleziaj organizaĵoj en tutmondo. Tie ankaŭ devas esti kreita mondsignifa biblioteko, estu kolektita literaturo el tutmondo pri ĉi tiuj problemoj. Tie devas esti antireligia universitato, tie devas esti lekciejoj kaj kunvenejoj, kaj tie devas esti malgranda komunloĝejo por delegitoj, kiuj venas al ni el diversaj landoj. Ni povus efektivigi kaj dum du-tri jaroj krei tian institucion, por ke apogante sin je ĝi nia tutmonda movado de l'proletaj ateistoj povu disvolvi sian laboron pli vaste. Mi petas vin pridiskuti ĉi tiun problemon en viaj organizaĵoj. Estas necese eldoni literaturon en eksterlandaj lingvoj pli vaste ol tion ni faras nun.

*Ni estas libera, volontula organizaĵo, ni ne estas registara organizaĵo, kaj ni povus plenumi tiun taskon. Ni volus, ke kamaradoj, laborantaj en kapitalismaj landoj, kontaktiĝu kun ni pli aktive*, ke ĉiu lando liveru al nia gazetaro kelkajn korespondantojn. Niaflanke, ni povus same organizi klarigon de nia laboro en via gazetaro. Ni devas fari tion por disvastigo kaj evoluigo de internacia proleta movado. Ni devas mencii, ke *ni havas komunajn internaciajn taskojn*, ĉar se diferencas cirkonstancoj en diversaj landoj, tamen la signifo de religio ĉie, *laŭesence*, estas sama. Vi povas nomi nek unu landon, kie ajna religia organizaĵo estas direktita *kontraŭ kapitalista regado*. *La frazeologio* de tiu aŭ alia pastro aŭ predikanto povas esti laŭforme direktita kontraŭ la kapitalismo, sed, laŭesence, ĉiu religia organizaĵo (mi ne diras pri apartaj kredantaj laboristoj aŭ proksimaj al laborista movado) estas direktata por subtenado de l'ekzistanta kapitalista ordo.

Jen, ekz., la lasta alvoko de la papo pro la senlaboreco. Pri kio en ĝi temas, al kio vokas la papo? Ja ni bone konas, ke la katolika eklezio havas proprajn grandajn fabrikojn, uzinojn, bienojn, ke la katolika eklezio estas la plej granda kaj riĉa organizaĵo. La papo tute ne vokas por transdoni ĉiujn kolektitajn riĉaĵojn al senlaboruloj por ne lasi popolamasojn malsati en nuna malfacila tempo. Li vokas al *bonfaro kaj mizerikordo*, laŭ diro de l'katolika eklezio «misericordia»[1] Sed mi memorigas al vi, ke dum la imperialista milito oni nomis «misericordia» mallongan ponardon, sur kiu estas ĉi tiu surskribo kaj per kiu membroj de «piaj» militantaj organizaĵoj finmortigis sur batalkampo vunditojn. Jen kio estas «misericordia», al kiu vokas nun la katolika eklezio, ĝi tre similas al tiu ponardo, per kiu oni finmortigis vunditojn.

Nun, kiam la kapitalismo travivas tre profundan krizon, sendube, okazos provoj inter ekleziuloj *adaptiĝi* al novaj batalkondiĉoj, trovi tian muziktitolon, tian tonon, ke ŝafoj restu vivaj kaj lupoj estu sataj, ke ne estu tuŝita eklezieksisto mem. Mi opinias, ke ni ĉiuj devas tre atenteme observi tiaspecajn fenomenojn kaj senvualigi sencon de ĉi tia adaptiĝo de eklezio, veran sencon de ĉiuspecaj falsagordiĝoj kun humoro de laboruloj. Tian sencon vi povas vidi, ekz., en la sama lasta epistolo de l'papo.

---

[1] Legu: mizerikordia



Mi volus, kamaradoj, ke nia hodiaŭa konversacio servu al celoj de ankoraŭ pli firmaj internaciaj kunligoj de nia antireligia movado.

Morgaŭ ni festos sur Ruĝa Placo kaj sur ĉiuj placoj de nia granda lando komencon de la XV jaro de Oktobra revolucio. Mi opinias, ke ne estas malproksima tiu tempo, kiam ne nur ni en nia lando kalkulos ĉi tiun jaron la 15-a jaro de nova epoko kaj kalkulos jarojn ekde komenco de Oktobra revolucio, sed kiam venos tagoj, kaj ili post ĉiu horo alproksimiĝas, en kiuj en tutmondo ni jarkalkulos ne ekde naskotago de mita kristo, sed ekde la tago de vere granda tagiĝo de l'nova homaro, ekde la tago de Oktobra revolucio en 1917 j. (*Bruaj aplaŭdoj*).

---

## RESPONDOJ DE K-DO JAROSLAVSKIJ AL FARITAJ DE LA DELEGITARO DEMANDOJ.

Nun permesu al mi respondi al la demandoj, kiuj al mi estis proponitaj skribforme.

La plejparto de la demandoj, kiuj vin interesas estas klarigitaj en la broŝuro en germana kaj esperanta lingvoj «Unio de Militantaj Ateistoj kaj ĝia laboro». Vi ĉiuj havas ĉi tiun broŝuron kaj povas trovi en ĝi respondojn pri multaj demandoj. Pri la statistiko kaj aliaj informoj mi penos kiel eble plej plene respondi.

DEMANDO. Kiom da ekleziaj organizaĵoj estas en rusa ortodoksa eklezio kaj kiu estas gvidantoj de ĉi tiuj diversaj eklezitendencoj?

RESPOMDO. Ni ne statistikas ekleziajn organizaĵojn. Tion faras registaraj institucioj. Tial ĝustajn informojn ni fari por vi ne povas. Gvidantojn de ĉiuj eklezitendencoj mi nomi ne scias nuntempe, ĉar kredantoj ofte ilin ŝanĝas. Se vi bezonas tiujn informojn mi penos liveri al vi.

DEMANDO. Ĉu estas vero, ke mitropolito Sergio prezentas la superan gvidantaron de l'rusa eklezio?

RESPONDO. La ortodoksa eklezio ne estas io tuteca. Sed ĉar la eklezio dividiĝas je «viva» kaj «malviva», je malnova ortodoksa kaj modernigita, mitropolito Sergio ĉefas la malnovan. Inter la eklezioj okazas batalo pro influo al kredantoj. Ekz., hodiaŭ tiu aŭ alia ekleziorganizaĵo okupas preĝejon kaj ĉi tiu organizaĵo estas malnoveklezia, kaj morgaŭ venas pli multa parto de kredantaj civitanoj, kiuj apartenas al la modernigita eklezio. La ŝtato ĉi tiun aferon ne intervenas. Unio de ateistoj, certe, ankaŭ ne interesiĝas proksime tiun aferon. Pro tio oni povas citi Hejne, rilate la disputo inter pastro kaj rabeno. Kiam oni demandis iun belan virinon, kiu el la disputintoj estas pli bona, ŝi respondis, ke «ambaŭ ili same malbonodoras». Ni opinias, ke grava diferenco inter la «viva» kaj «malviva» eklezioj ne ekzistas, kaj ni ne interesiĝas por ke estu subtenita de ni en ĉi tiu batalo tiu aŭ alia popo.

DEMANDO. Ĉu ekzistas en Sovetio forta movado de evangeliaj kristanoj, kiel informas eklezia gazetaro en Germanio?

RESPONDO. Tia momento estis, kiam komenciĝis disfalo de la ortodoksa eklezio kaj per ĝia eksmembraro komencis kreski kelkiuj aliaj religiaj orga-



nizaĵoj, precipe sektanaj komunumoj. Nun tion ni jam ne povas konstati. Oni ne povas diri, ke la evangeliana movado d i s v a s t i ĝ a s.

Nun mi diru pri partopreno de kulakoj en religiaj organizaĵoj. Kulakoj kaj aliaj kontraŭrevoluciaj elementoj povas vesti sian batalon kontraŭ komunistoj, kontraŭ Soveta potenco per religia formo, indikante evangeliajn tekstojn. La kulakoj, ekz., diras, ke se la kolhozo estas ĝusta afero, do kial kristo ne aranĝis kolhozojn k.s.

DEMANDO. Ĉu estas ĉe Centra Konsilantaro de UMA centra informejo, kiu kolektas ĉiujn falsajn, kalumniajn informojn pri Sovetunio, havantajn principecan signifon por dece rebati ilin?

RESPONDO. Mi jam respondis, ke tia oficejo malestas, sed ĉi tiun laboron ni devas kun via helpo aranĝi. Ni esperas, ke la hodiaŭa konferenco helpos al ni meti ĉi problemon sur pli konkreta grundo.

DEMANDO. Ĉu estas statistikataj provoj de pastraro malordigi plenumon de l'kvinjarplano kaj pro kiuj motivoj ĝi tielmaniere agas?

RESPONDO. Tian specialan statistikon ni ne okazigas, sed ni havas skizajn informleterojn, kiujn ni regule dissendas al ĉiuj niaj filioj de UMA. Ĉi tiuj informleteroj estas kompilataj sur bazo de gazetaj informaĵoj kaj korespondaĵoj, ricevataj de ni elĉie. La pastraro fakte provas malordigi la kvinjarplanon. La ekleziuloj, ekz., uzas jenan manieron batali kontraŭ la kvinjarplano: dissendo de «leteroj de ĉielo». Kamparano ricevas per poŝto leteron, kiu kvazaŭ estas ekspedita al li de ĉielo, en kiu estas skribita, ke kolĥozoj estas kontraŭdia fenomeno, kontraŭanta al religio, ke estas necese eksiĝi el kolĥozo, spite tio dio punos kolĥozanojn. Iufoje en similaj leteroj estas dirate, ke certan tagon ĉiuj kolĥozanoj estos punitaj, mortos en certa mortformo, aŭ estos mortigitaj per tondro, aŭ estos ekzekutitaj en certa severega formo.

Similspeca propagando estas vaste utiligata. Oni ankaŭ disfamigas ke kvazaŭ baldaŭ okazos interveneo kaj la kolĥozanoj estos mortigitaj unuavice. Ĉi propagando estas efektivigata precipe de ekleziuloj kaj de sektanaj predikantoj.

DEMANDO. Ĉu estas vero, ke instruistoj, antaŭ ol enoficiĝi devas plenigi enketon, en kiu estas rubriko pri tio, ĉu ili estas kredantoj aŭ ateistoj. Ĉu kredantaj instruistoj ne povas ricevi laboron en lernejo?

RESPONDO. En lernejo ĉe ni estas efektivigata antireligia edukado, sed specialaj enketoj pri religiemo de l'instruistoj forestas. Certe, ke ne malebłas, ke ie ajn, en iu aparta rajono aŭ en iu aparta lernejo simila demando estis proponita al instruisto. Tio eblas, certe, ĉar ni opinias, ke tiurilate, se la afero koncernas antireligian edukadon, la homoj devas esti ideologie elprovitaj. Tie temas pri la ideologio, pri la ideologia eduko. Kiel ni postulas de ĉiu kompartiano, ke li estu ideologie elprovita, same ni postulas, ke la homo, al kiu ni konfidas edukadon de infanoj, ne faru laboron kontraŭan al nia gvidlinio. Sed tio tute ne signifas, ke ni postulas de ĉiuj pedagogoj r i f u z o n je religio.

DEMANDO. Ĉu vere estas, ke profesoroj de Scienca Akademio estas devige sendataj dum pasko fari referatojn kontraŭ religio? Kaj ĉu konformas al efektivo, ke lernantoj estas trude devigataj organizi UMA-ĉelojn precipe dum religiaj festoj? (Rido inter ĉeestantoj).

RESPONDO. Vi atentu, kamaradoj, ĉi tiu demando instigis inter ni tre

ĝojan humoron, ĉar ni neniun trude devigas aliĝi al ateistoj. Ni aldonu al tio, ke inter malnovaj profesoroj estas renkonteblaj kelkiuj religiaj homoj. Sed estas memkompreneble, ke en la Scienca Akademio estas kamaradoj, kiuj tre volonte partoprenas antireligian propagandon, ekz., prof. Tan-Bogoraz k.a. Ni havas societon VARNITSO, kiu okupas sin per propagando de novaj teknikmetodoj de l'soveta socialisma konstruado. Tiun societon partoprenas tre multaj scienculoj, kiuj faras antireligian propagandon. Sed ĉio ĉi, kompreneble, estas farota t u t e  l i b e r v o l e.

DEMANDO. Ĉu estas vero, ke en lernejoj oni devigas lernantojn organizi UMA-ĉelojn kaj precipe dum religiaj festoj?

RESPONDO. Ĉi tiu demando estas bazita sur tio, ke kamaradoj ne konas la statuton de UMA. UMA e s t a s  l i b e r v o l a  o r g a n i z a ĵ o. Neniu infano estas devigebla UMA-aniĝi. K a j  e s t u s  m a l u t i l e,  s e  n i  d e v i g e  a n i g u s  j u n a j n  a t e i s t o j n. Ĉi tiu organizaĵo estas konstruita same sur libervolaj principoj. Se junaj ateistoj iufoje elmontras militeman ardon kaj komencas hontigi siajn kamaradojn pro tio, ke ili ne UMA-aniĝas, pro tio ni ne povas ilin riproĉi.

DEMANDO. Ĉu vere estas, ke en Moskvo dum religiaj festoj la preĝejoj estas homplenaj?

RESPONDO. Vi scias, ke pri malnova Moskvo oni diris, ke ĝi havas «kvardek kvardekojn» t. e. 1600 preĝejojn. Fakte antaŭ la revolucio la preĝejoj estis duoble malmultaj — ĉirkaŭ 800, enkalkulante preĝejojn ĉ e  l e r n e j o j,  k u r a c e j o j,  m i l i t k a z e r n o j  k a j  a l i a j  i n s t i t u c i o j. Preĝejoj estis ĉe grandaj lernejoj kaj eĉ multaj komercistoj havis siajn e n d o m a j n  preĝejojn. Ĉar la domoj estis municipaligitaj, ĉi endomaj preĝejoj ĉesis ekzisti jam en dua tago de l'revolucio. En ĉiuj ŝtatinstitucioj post kiam estis efektivigita leĝo pri apartigo de l'eklezio for de l'ŝtato, ĉesis funkcii ankaŭ la preĝejoj ĉe militkazernoj, hospitaloj, lernejoj, stacidomoj k.a. Sed en Moskvo restis ankaŭ post tio sufiĉe multaj preĝejoj, do famoj pri tio, ke ni likvidis en Moskvo ĉiujn preĝejojn aŭ ke ili estos likviditaj dum la lasta jaro de l'kvinjarplano, t.e. en 1932 j., ĉi tiuj famoj estas el speco de fantiziaĵoj kaj blankelmigrintaj elpensaĵoj, celantaj instigi malamon de l'okcident-eŭropa kaj tutmonda etburĝaro, estanta ankoraŭ sub influo de eklezio kaj religio.

Estas necese mencii, ke kiam okazas elektoj por sovetoj, laboristoj de preskaŭ ĉiu fabriko postulas fermi preĝejojn, situantaj en iliaj rajonoj. Se ni ĝuste plenumus la rekomendojn, kiujn faras dum la elekto elektantoj, ni devus jam tre antaŭlonge efektive fermi ĉiujn preĝejojn, ĉar grandega parto de moskva loĝantaro estas malkredantoj, kaj ili opinias pli utila, ke en ĉiuj preĝejoj estu kluboj, infanvartejoj aŭ aliaj utilaj por la popolo institucioj. Estas necese ankaŭ scii, ke la preĝejoj ne estas simple likvidataj. Ne, ili estas transformataj en lernejojn, aŭ teknikumojn, en klubojn aŭ iujn aliajn instituciojn kaj iufoje en grenejojn. Ĉi aranĝoj ne nur ne elvokas iun malkontenton de loĝantaro, sed kontraŭe renkontas simpation kaj subtenon. Por kredantoj, — ĉar ĉe ni tamen ankoraŭ estas kredantoj, — estas konservitaj kelkdekoj de preĝejoj de diversaj konfesioj en sola Moskvo kaj ankoraŭ e k z i s t a s  m i l d e k o j  d e  p r e ĝ e j o j  d e  d i v e r s a j  k o n f e s i o j tra USSR. Sed ĉar antaŭe ĉi tiuj kredantoj distribuiĝis en multe pli granda nombro de preĝejoj,



certe, dum religiaj festoj preĝejojn nun vizitas multe da homoj. Tio estas vero, ke precipe multe da homoj vizitas preĝejojn en paskofesto. Sed pri tio necesas diri, ke ekz. en la paskonokto, kiu prezentiĝas kiel teatra spektaklo en preĝejo, multaj personoj vizitas ĝin ne pro tio, ke ili estas kredantoj, sed por observi ĉi spektaklon, kaj junuloj vizitas simple por rendevuoj. Do, estas malfacile diri, kiom da kredantoj aŭ nekredantoj tie estas. Mi ne opinias, ke ĉiuj ĉi junaj personoj kiuj gee venas en pasko en preĝejojn estas religikonfesantoj. Almenaŭ, se aŭskulti iliajn interparolojn, ili estas tre malproksimaj de diservo, plenumata en paskonokto, kaj tute ne memorigas evangeliajn tekstojn kaj biblion.

Jen estas ĉio, kion mi povas diri pri tio. Estas fakto, ke ĉe ni okazas tre rapida malmultiĝo de preĝejoj. En kelkiuj rajonoj tio estas tre klare rimarkebla, en aliaj ne tiom klare. Ni havas tiajn malnovajn urbojn kiel Arzamas, Murom, Kaŝin, Perejaslval, Kostroma, Jaroslavl, en kiuj preĝejoj estis tre multaj. Se oni ilin nun likvidas kaj malkonstruas, tio okazas nur pro tio, ke ili ofte malhelpas stratan movadon kaj jam estas al neniu bezonataj. Vi povas vidi sur Arbat-placo en Moskvo similan bildon. Se en la pasinta jaro tutan movadon baris la preĝejo, do nun kiam ĝi estas malkonstruita, fariĝis vasta spaco por trafiko kaj ne okazas homvundoj kaj mortkatastrofoj, kiuj tre ofte okazis pro malvasteco. Kaj la loĝantaro rilatas al tio tre bone. Iuj, certe, dekoj de finvivintaj maljunulinoj, du-tridekoj da laŭprofesiaj almozuloj, kiuj per ĉi preĝejo perlaboris sian nutraĵon, verŝajne, indignas. Sed se pasas duonjaro aŭ jaro, preĝejo estos forigita, sur ĝia loko estas plantita ĝardeno aŭ aranĝita sociutila institucio, kaj la loĝantaro diras neniun malkontenton, sed kontraŭe estas tre kontenta, ĉar oni forigis tian senutilan kaj eĉ malutilan institucion kiel preĝejo kaj kreis utilan por la popolo kulturan institucion.

DEMANDO. Ĉu estas malpermesata importo de biblio en USSR el eksterlando.

RESPONDO. Kamaradoj, en USSR entute libera importo de iuj ajn varoj ne ekzistas. Kiel vi scias, ĉe ni estas monopolo de l'eksterlanda komerco kaj ĉ i u importo el eksterlando s e n  s p e c i a l a  p e r m e s o, certe, ne estas permesata ĉe ni.

Tio ankaŭ koncernas la biblion. La biblioj tute ne estas tiom bona varo, por ke ni povu fari por ĝi esceptojn. Ĉiuokaze mi scias, ke kelkfoje estis permesita importo de biblioj kaj sufiĉe multkvante, po kelkdekoj da miloj. Kelkfoje estis permesita eldono de la biblio en nia lando, aparta eldono de l'biblio estis permesita ankaŭ por sektanaj organizaĵoj, sed, certe, tioma nombro de biblio, kioma estis antaŭe disvastigata de bibliaj asocioj en diversaj lingvoj, nun ĉe ni ne estas. Mi memoras, kiam mi estis en bagno, al ni venis misiisto, li diris en angla lingvo kaj la tradukisto klarigis al ni, ke jen misiisto (inter alie, tiu estis virino) estas reprezentanto de l'biblia societo kaj deziras helpi nin pro nia malfacila vivo en la bagno kaj tial ŝi disdonas al ni bibliojn. Ni prenis de ŝi ĉi tiun biblion, sed utiligon el ĝi ni faris diversan, kiun — mi nun ĝenas diri, vi mem povas konjekti pri tio. Nur malmultaj en la malliberejo legis disdonitan de l'misiisto biblion. Oni ne povas diri, ke la biblio helpis iom al ni, ĉar tiuj samaj homoj, kiuj tenis nin en malliberejo dum cara registaro, ili ĉiuj estis k r e d a n t o j, kaj ĉi tiuj homoj opiniis, ke necesas nin ofende trakti kiel brutojn, ke oni povas nin vergobati kaj malhonorigi, sed tio ne malhelpis ilin subteni disvastigon de biblio.

Nun, kiam la stato estas tia, ke decido pri la demando, ĉu disvastigi aŭ ne la biblion, estas decidebla de ni, ni ne volas helpi disvastigon de biblio. Tamen samtempe ni ne malpermesas biblion. Eĉ pli, ni havas la poŝtan konvencion, kiu permesas ekspedon de libroj en la landon. Jen ĉi tie la kamarado informas, ke la presejo, al kiu estis mendita por presado religia literaturo, kaj ĝiaj laboristoj rifuzis komposti kaj presi ĉi tiujn eldonaĵojn. Sed tio estas tute alia afero: ne ni prenu la taskon admoni laboristojn, por ke ili presu biblion kaj aliajn religiajn eldonaĵojn. Ni tiurilate nek iomgrade estas interesitaj.

DEMANDO. Ĉu ekzistas sektanaj komunoj, laborantaj por bono de l'socialisma konstruado kaj sektanaj agrokolektivoj, socialisme gvidataj?

RESPONDO. Kamaradoj, ĉi tiu problemo estis diskutita en nia ateista kongreso kiel problemo pri sinteno al la sektanaj komunoj. Ni tenas la vidpunkton, ke specialajn komunojn, kunigantajn homojn laŭ r e l i g i a principo, ni ne devas organizi. Ni devas batali kontraŭ kreado de komunoj sole el ortodoksaj, sole el katolikaj, hebreaj, aŭ mahometanaj kolĥozanoj, kie estus malpermesita aliĝo al ordoksano aŭ hebreo, aŭ al nekredanto, aŭ turko laŭnacie, kiu ne estas mahometano. Ni opinias, ke neniu ekonomia amasa organizaĵo rajtas bari aliĝon al si por homoj, konfesantajn tiujn aŭ aliajn religiopiniojn aŭ por tute malhavantaj religiopiniojn, ĝi ne devas dividi laborulojn laŭ religia principo. Certe, estas tute alia afero, se religia vesto servas por ŝirmi ĝuste kontraŭrevolucian organizaĵon, kiel tio okazis en la sekto «Teodoranoj» (Fedorovci), «Nomglorantoj» (Imjaslavci) k.a. kontraŭrevoluciaj organizaĵoj, neantaŭlonge juĝitaj. Aŭ, ekz. ne tiom antaŭlonge estis senvualigita la sekto» de iu Dmitrio Ŝulc, kies membroj estis ligitaj per homoseksualaj malnaturaĵoj, en kiu estis praktikataj sadismaj turmentadoj, en kiu estis efektivigata vera kontraŭrevolucia propagando. Tiajn «religiajn» organizaĵojn ni ne rajtas taksi alie ol la kontraŭrevoluciaj.

Samtempe ni scias, ke ĉe ni estas tutaj regionoj, kie tiu aŭ alia sekto havas tre multajn adeptojn. Ekz., en iu regiono estas multaj menonitoj. Ĉu rajtas ĉi tiuj menonitoj organizi komunojn-kolĥozojn? Ni opinias, ke malpermesi al ili tion oni ne devas, sed ni devas malpermesi al ili komunon tiel, ke al ĝi ne rajtu aliĝi n e menonitoj. Ni havas en Sovetio por ĉiuj kolĥozoj ekzemplan statuton de laborkooperativo, komuno. La ŝtato ne permesos tian statuton de komuno, al kiu estus malpermesita aliĝo de homoj laŭ religia principo aŭ al malkredantoj. G u s t e, k r e o n d e k o l ĥ o z o j, k o m u n o j l a ŭ r e l i g i a p r i n c i p o n i o p i n i a s e r a r a, m a l u t i l a. Ni havas multajn kolĥozojn, en kiuj estas ankoraŭ multaj kredantoj. Ĉi tiuj kolĥozoj ofte konstruas tre bone sian socialisman mastrumon. Sed tie, kie tre multe influas gvidantoj de sektanoj kaj aliaj religiaj organizaĵoj, tie ili aspiras laboron de tiuj ĉi kolĥozoj direkti tielmaniere, ke estu efektivigata batalo kontraŭ niaj konsekvence plenumataj socialismaj planoj. En kelkaj similaj sektanaj organizaĵoj, agantaj sub speco de komuno aŭ laborkooperativo efektive okazas treega ekspluatado. Ni, ekz., likvidis la komunon tielnomatan «BIĈ». Ĉi komuno estis proksime de Leningrado. «BIĈ» signifas en rusa lingvo «vipo», sed tiu nomo estis mallongigita «Bratec Ivan Ĉurikov» («Frato Johano Ĉurikov»). Ĉurikov estis la sektano, ĉefo de sektana grupo, kaj ekspluatis plej senhonte, plej arogante sentojn de kredantoj, ilian laboron kaj ilian monon. N e n i u k o m u n o f a k t e t i e e s t i s — ĝ i e s-



t i s p e r n o m o d e k o m u n o k o v r i t a p l e j s e n h o n t a e k s p l u a t a d o, p l e j m a l n o b l a a m a s t r o m p o.

Sed ni ĉiam diferencigas: unuflanke — amaso da kamparanoj, laboruloj, kiuj povas esti religiemaj, kiuj povas esti membroj de tiu aŭ alia sekto, kiuj ankoraŭ ne liberiĝis je religio, kaj aliflanke — s u p r a ĵ o d e s e k t a n a r e l i g i a o r g a n i z a ĵ o, metanta antaŭ si tute aliajn taskojn kaj celojn, certajn p o l i t i k a j n taskojn kaj celojn. Kaj ni, diferencigante tiel, batalas tial ne kontraŭ kamparanoj, kiuj ankoraŭ ne forlasis religian kredon kaj aliĝas al komuno: batalante kontraŭ iliaj religiaj opinioj, ni kontraŭ ili mem ne batalas, ne rilatas al ili malamike, ĉar n i a t a s k o e s t a s a l i f o r m i g i i l i a n m o n d k o n c e p t o n, h e l p i a l i l i s t a r i ĝ i s u r n o v a n v o j o n. Sed ni batalas kontraŭ antisoveta, antisocialisma politiko de sektanaj kaj aliaj religiaj organizaĵoj, ĉar ĉi organizaĵoj faras tian politikon, kiu multgrade baras konsekvencan evoluon de nia socialisma konstruado kaj kutime estas m a l k a ŝ e malamika al ĝi.

Tio ne faras escepton, ke en multaj komunoj kaj kolĥozoj, en kiuj plimulto ankoraŭ estas sektanoj aŭ entute kredantoj, estas iafoje kiel gvidantoj membroj de nia partio: ni devas labori en tiaj organizaĵoj por helpi tiujn homojn liberiĝi je religia influo.

Kamaradoj, mi havas por vi unu praktikan proponon. Ĉar, verŝajne, vi devos klarigi nome ĉi tiun problemon, mi proponas la jenon: al vi oni disdonos materialojn pri kolĥoza movado, inter ili estas ankaŭ modela statuto de kolĥozo, vi konatiĝos kun ĝi kaj vidos, sur kiuj principoj estas organizitaj kolĥozoj kaj komunoj.

DEMANDO Ĉu estas vero, ke dum pasko 1930 en Harkovo troviĝis en malliberejo 70 pastroj? Se jes, do pro kio?

RESPONDO. Ni ne kontrolobservas malliberejojn. Eble en Harkovo en malliberejo eĉ efektive estis dum pasko pastro kaj eble eĉ ne unu. Sed ĉe ni ĝuste en Ukrainio, kiel vi scias, proksimume ĉirkaŭ tiu tempo okazis la proceso de l'aŭtokefala (aŭtonomia) eklezio kaj de l'kontraŭrevolucia organizaĵo Unio por liberigo de Ukrainio (SVU). Ambaŭ ĉi organizaĵoj estis intime interligitaj kaj ambaŭ organizaĵojn partoprenis pastroj. Ĉi tiu kontraŭrevolucia organizaĵo celis renversi la sovetpotencon, restaŭri burĝan sociordon kaj allogi por tio eĉ eksterlandan helpon. Mi opinias, ke kiam vi kaptos potencon kaj se iu partia grupo organiziĝos por renversi proletan potencon en Germanio, vi faros tre grandan eraron, se vi tiun grupon de pastroj ne kaŝos en malliberejon.

Nun okazas batalo en Hispanio. Tie la pastraro ludas gravan rolon. Kaj se la laborista klaso posedus regpotencon, ĝi, certe, pli severe agus kontraŭ kontraŭrevoluciaj komplotistoj el pastraro ol tion faras burĝa registaro en Hispanio.

DEMANDO. Ĉu ekzistas pastroj, kiuj disputas kun ateistoj pri fundamentaj problemoj de l'mondkoncepto kaj filozofio tute publike kaj en samaj kondiĉoj.

RESPONDO. Nia antireligia movado travivis periodon de tre vastaj diskutoj kun pastroj kaj entute kun kredantoj, kaj mi mem dum kelkaj jaroj partoprenis tiajn diskutojn kun popoj. Ni aranĝis dum pasintaj jaroj niajn disputojn tielmaniere, ke ni speciale invitis reprezentantojn ed ekleziaj or-